## Ĉapitro tri: La nova observisto

La ŝipo estas en la haveno apud la kajo. Sur la ferdeko staras ŝipestro kaj subŝipestro.

"Permesu al mi rimarki," diras la subŝipestro: "ke ni havas grandan problemon. La holdo estos baldaŭ plena, kaj baldaŭ venos la horo por nia foriro, sed ni ne havas observiston por nia ŝipo."

"Jes, tio estas granda problemo," respondas la estro: "sed baldaŭ venos kandidato al la ŝipo, kaj mi pridemandos lin."


Subite, jen laŭta bruo! Malalta viro falas de la kajo al la ferdeko. La subŝipestro kuras al li kaj helpas lin.


"Dankon! Dankon! Ĉi tio estas tre danĝera kajo!" diras la viro.

"Sed vi ne estas sur la kajo; vi estas sur nia ŝipo!" respondas la subŝipestro.

"Ho! Jes. Ŝipo. Jes. Daaa! Jes, mi estas kandidato, kaj mi venas por laboro."

La estro marŝas al li. "Bonan tagon." li diras: "Mi estas la estro de la ŝipo al kiu vi falis! Mi nomiĝas Mandanto, mi nun pridemandos vin."






"Mi estas preta! Mi respondos al la demandoj!"

"Unua demando...kiu estas via nomo?"

"Ho! La malfacilaj demandoj venas unue! Mia nomo... Daaa!... Mi forgesis."

"Mi forgesis." skribas la estro.

"Dua demando. Ĉu vi laboris en aliaj ŝipoj?"

"Daa! Jes, en unu alia ŝipo. Ĝia nomo estas...daa!...mi forgesis."

"Tio estas interesa," krias la subŝipestro: "la sama nomo por la ŝipo kaj por vi! «*Mi forgesis*» stranga nomo! Inte..."

La ŝipestro frapas la subŝipestron kaj diras: "Tria demando. Ĉu vi estis observisto en la observejo de la alia ŝipo?"

"Observisto?" respondas la kandidato, kies nomo fakte estas Lo: "Ne precize! Mi estis servisto. Servisto en la kuirejo. Sed ne estas granda diferenco: observisto kaj servisto!"

"Ve!" diras la estro: "Lasta demando. Pri geografio. Sur la mapo estas kvar direktoj. Nomu ilin!"

"Daar! Suda kaj orienta kaj ... daar! ... suda kaj orienta kaj... okcidenta! Kaj...suda kaj... orienta kaj...suda...kaj ...daar!" hezitis tiu ne tro inteligenta sinjoro Zaklap.

"Nu! Tri bonaj respondoj el kvar ne estas malbona rezulto! Mi gratulas vin. Vi estas nia nova observisto. Ni baldaŭ foriros de la haveno."


"Bone. Mi estas preta. Kie estas la kuirejo?"

"Ne kuirejo, observejo! Ĝi estas ĉe la supro de la masto! Ĉe la supro de la dudek-metra masto!"

Lo rigardas supren.

"Glut'!", li diras.

## Ĉapitro kvar: Li ankoraŭ dormas




La trajno forveturas de la stacidomo. Ĝi iras apud la domo, kie dormas la profesoro. La lokomotivo venas al la domo kaj fajfas laŭte apud la fenestro de la dormoĉambro. Sed la bruo de la lokomotivo ne vekas la profesoron! Li ankoraŭ dormas!

La trajno foriras de la domo, sed ĝi baldaŭ venos al la haveno kaj la levponto.

Ĝi venos tro frue!

## Ĉapitro kvin: Pontestro kaj papersvarmo

Malgranda domo staras apud la levponto. En tiu domo loĝas la pontestro Lev, kaj lia edzino Marga. La telefono sonas! Sed kie estas la telefono? Sur la tablo kuŝas multaj paperoj kaj la telefono estas sub ili. La edzo kaj la edzino kuras inter la paperoj kaj serĉas la telefonon inter ili. Ili levas la paperojn. La edzo trovas la telefonon kaj li respondas ĝin:

"Bonan tagon! La pontestro parolas."

"Bonan matenon," diras la voĉo: "Mi nomiĝas Mandant. Marko Mandant. Mi estas la estro de la ŝipo «Espero». Ni estas en la haveno kaj mia ŝipo estas preta. Ni baldaŭ iros de la haveno al la maro. Ni baldaŭ venos al via ponto. Ĉu trajnoj venos? Ĉu vi levos la ponton por mi?"

"Atendu momenton. Mi serĉos mian libron pri la trajnoj."



La edzo kaj la edzino denove kuras inter la paperoj kaj levas ilin. Ili ne trovas la libron pri la trajnoj. Fine, la edzino levas la telefonon. Jen la libro. La edzo legas kaj diras:

"Ha, jes! La unua trajno forveturos de la stacidomo je la sepa horo. Ĝi venos al mia ponto je la sepa dek kvin. Nun estas dek minutoj antaŭ la sepa. Mi mallevos la ponton post dudek minutoj, je la sepa kaj dek."

"Do, mi rapidos. Ni foriros tre baldaŭ de la haveno. Ĝis revido!"

"Ĝis revido!"





## Ĉapitro ses: La ŝipo forveturas

La ŝipestro diras: "Post dudek minutoj ili mallevos la ponton. Ni iru rapide!"

"Jes, estro!" respondas la subŝipestro: "La holdo nun estas plena."

"Plena?" krias la estro: "Sed ankoraŭ restas unu cilindro. Ĝi nun venas, rigardu!"

La subŝipestro rigardas.




"Permesu al mi rimarki," li diras: "ke ni nun havas grandan problemon. La holdo estas tute plena!"

"Ĉu estas spaco sur la ferdeko?"

"Jes, estro, estas spaco apud la avertaj raketoj."

"Bone," decidas la estro: "la lasta cilindro staros sur la ferdeko. Ĉu la nova observisto estas en la kuirejo?"

"Ne kuirejo...observejo!" korektas la subŝipestro: "Jes, li estas en la observejo. Sed permesu al mi rimarki, ke li ne estas tre inteligenta!"

"Ankaŭ Kristoforo Kolumbo ne estis tre inteligenta, sed li trovis Afrikon!"

"Li trovis Hindion, fakte. Sed ni nun iru!"

## Ĉapitro sep: Danĝero ĉe la levponto!"

Lev Pont rigardas. Li vidas fumon! "Tio estas stranga," li krias: "trajno venas! Sed estas nur kvin minutoj post la sepa! La trajno venas tro frue! Rapidu, mallevu la ponton!"

"Sed kie estas la ŝanĝstango?" krias Marga: "La paperoj kuŝas sur la tuta tablo. Mi ne vidas la ŝanĝstangon! Helpu! Danĝero!!"



Lev trovas la ŝanĝstangon. Li mallevas la ponton. Sed nun venas nova bruo! La ŝipo «Espero» fajfas. Ĝi venas al la ponto! La trajno kaj la ŝipo venas al la ponto en la sama momento.




**"Haltu! Haltu, ŝipo! Haltu, trajno!"** krias Lev.

Sed tio ne helpas. La ŝipo ne haltas kaj la trajno ne haltas.

